Vi lernos, kaj praktikos

Kial? => Ĉar

Bonvolu uzi la sekvantajn respondojn por la subaj demandoj:

* estas bela kaj afabla * estas la tria nokte * ŝatas fumi multe
* trinkas tro da vino * havas grandan kapon * havas malbonajn okulojn
* ne havas aŭtomobilon * estas interesa kaj bone verkita
* malamas ilin * estas facila lingvo
* bezonas lakton, fruktojn, legomojn, kaj viandon
* soifas * malsatas * estas tre laca post la laboro
* estas scivolema * estas tre bongusta

Bonvolu skribi la respondojn laŭ la unua modelo.

1 Kial Petro dormas nun?

=> Li dormas nun, ĉar estas la tria nokte.

2 Kial Rikardo fumas multajn cigarojn?

3 Kial Paŭlo amas Marian?

4 Kial la personoj en bildo 12 uzas tramon?

5 Kial Sinjoro Nopo mortigas muŝojn?